

& Sopiris junreĝido:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 186 paŝoj dum 2 minutoj. El germana tradukis Arthur Degen (Norda Prismo, 58/2, p. 102). Ne sciante la originalan popolmelodion baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (

/do remi redo SoSo; So dodo remi re; fa sola somi dodo; So mimi mire do;

(#Rekantaĵe: dodo remi redo SoSo; dodo dodo remi re; fafa sola somi; doSo mimi mire do;)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 /Sopiris junreĝido ; kaj bela reĝidin',
; sopiris amkunvenon ; – la mar'
malhelpis ĝin.

(×:; **Dancu per la ses piedoj ; Dancu
paŝon post la paŝ' ; Ĉiun paŝon
kredu ; Dancu paŝon post la paŝ'.**)

'2 "Karulo, vi povas naĝi, ; aĥ naĝu do
al mi! ; Kandelojn mi bruligos. ; Allogu
vin la tri!"

'3 Malica monaĥino ; maldormis pro
envi'; la kandelojn ŝi estingis. ; – En
ondoj dronis li.

'4 Fiŝisto longe serĉis ; – lin trovis en la
mar'. ; Kun pala la virgulino ; ploradis
bord-florar'.

'5 Ŝi prenis la karulon, ; karese kisis lin.
– – – ; De alta roko saltis ; en maron la
reĝid'.

'6 Sonoras de la turoj ; – vualas sin la
sun', ; ĉar ambaŭ gereĝidoj ; en tombo
dormas nun.)